

Svisa Esperanto-Societo informas

1998 numero 4a: septembro / oktobro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiku: por Claude Gacond

Vivo de SES

Speciala oferto al la membroj de SES

Laŭ longjara kontrakto inter SES kaj LF-koop, niaj membroj ricevas la revuon *Literatura Foiro* entenita en sia jarkotizo. Lastjare ni provis oferti laŭdezire kaj anstataŭe la gazeton *Heroldo de Esperanto*. 13 membroj petis pri tio, sed ne ĉiuj ĝin jam ricevis pro malfruigoj.

Ni rehavis kontakton kun LF-koop kaj prezentas al vi jenan specialan oferton. Ekde 1999 vi povos ĝui pri la ricevo:

a) de *Heroldo de Esperanto* anstataŭ *Literatura Foiro* kontraŭ krompago de CHF 10.- pro la plusaj sendokostoj;

b) de *Literatura Foiro* kaj de *Heroldo de Esperanto* kune kontraŭ krompago de CHF 30.-

Interesatoj pri unu el tiuj proponoj sendu sian mendon ĝis fine de septembro al la prezidanto: Bruno Graf, Jurastrasse. 23, 3036 Ittigen kaj samtempe ĝiru la krompagon al LF-koop (pĉk 12-11114-5, Sté-coop Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds.

La Estraro informas

La Estraro kunsidis la 20an de junio kaj la laborgrupo pri varbado la 27an de junio, ambaŭ en Berno. Ni informas resume pri kelkaj demandoj, kiuj interesas la membraron.

Nia UEA-komitatano David Buhlmann rezignas plenumi duan oficperiodon kaj ne partoprenos la Universalan Kongreson en Montpellier. Mireille Grosjean

pretas transpreni tiun ĉi taskon kaj reprezentos nin jam en la ĉi-jara kongreso. La Estraro konfirmis ŝin en tiu ofico. Stanislaw Pochanke salutos la kongreson nome de Svislando.

Surbaze de propono de Sonja Brun la Estraro delegas la estraron Nicole Margot al la Forumo por la Esperanta Civito organizita de la Esperanta PEN-Centro la 9/10ajn de aŭgusto en La Chaux-de-Fonds.

La lingva revuo *Babylonia* 1998/1 entenas artikolon en la franca lingvo de d-ro Tazio Carlevaro. Temas pri resumo de la sociologia enketo, kiun li faris kaj prezentis en La Chaux-de-Fonds kadre de la kolokvo de CDELI en novembro 1996.

Montriĝis, ke ni bezonas naci-lingvajn tradukojn de la SES-statuto. Dietrich Weidmann verkis donace la germanlingvan version.

Mireille Grosjean proponis al Expo 2001, ke ĝi prezentu esperanton. Laŭ la respondo, kiun ŝi ricevis, la ideo ne konformas sufiĉe al la ekspozicia koncepto kaj sekve ne estis akceptita.

Ni anoncis, ke membroj povas peti la ricevon de *Heroldo de Esperanto* anstataŭ *Literatura Foiro*. La transiro ne ankoraŭ funkcias bone, kion ni bedaŭras. Nova oferto estas en preparo, laŭ kiu membroj povos ricevi

a) *Heroldon de Esperanto* anstataŭ *Literatura Foiro* kontraŭ kompago;

b) ambaŭ gazetojn je rabatita prezo.

La Estraro modifos la kontrakton kun LF-koop kaj abonos ekde 1999 la minimume aboneblan nombron kolektivan de 200 anstataŭ 227. Tio kaŭzas ŝparon de CHF 650.- LF-koop donos tiun bonuson afable jam por tiu ĉi jaro retroaktive.

La Estraro decidis krei novan modernan leterkapon. Rolfo Ernesto ellaboris proponojn, kiuj tre plaĉis. Kiel signeton ni elektis grafike desegnitajn terglobon. Ni atendas la presprovaĵon.

La Estraro diskutis la malaltigon de la plej altaj kotizoj, sed finfine rezignis pri modifoj. Tamen la abono de *SES informas* estos reduktita de CHF 45.- al CHF 25.- ekde 1999. Cetere ni klopodas pliiĝi la servojn al la membroj kaj provos peri librojn kun rabato.

La laborgrupo pri varbado pretiĝis projekton de "Enketado surstrata" por la Ago-Tago 1998. Vi povas legi pri ĝi en tiu ĉi numero. En studo kaj preparo estas kontaktkartetoj, infomiloj kaj varbiloj.

La prezidanto Bruno Graf.

Donacoj

La SES-kasisto Barbara Pochanke dankas pro la sekvaj donacoj:

Anonima: 45; Françoise Cork-Levet: 10.-; Pierre Dorthe: 15.-; Alice Kessler: 10.-; Jeanne Mamin: 20.-; Gertrud Merz: 5.-

Agado 2003

Jam plurfoje ni raportis al vi pri la celo de la **Agado 2003: Festi la centjaran jubileon de Svisa Esperanto-Societo kaj de la esperantiĝo de la pioniroj Hector Hodler kaj Edmond Privat per la publikigo de dokumentoj, kiuj ne nur raportos pri la pasintaĵoj, sed ankaŭ utilos por vaste diskonigi nian lingvon esperanto.**

Ni esperas, ke la aldonita poŝta pagilo trovebla centre de tiu ĉi numero de *SES informas*, sur kiu vi klare legos la indikon **AGADO 2003**, instigos vin al donacemo. Helpu al la verkantoj de la aluditaj dokumentoj per **malavara apogo.**

Ĥoj el la U.K.

La svisoj, kiuj estis nombre super kvindeko en Montpellier, revenis ĝenerale kontentaj pri sia partopreno en la Universala Kongreso: 3'200 personoj el 66 landoj, bona etoso, interesaj ekskursoj, tre konvena kunvenojo,

sufiĉe alta lingvonivelo, variaj programeroj.

Mireille Grosjean, la reprezentanto de SES ĉe UEA, prelegis dufoje, po unu dum la lingvistika seminario kaj dum la ILEI-konferenco.

Bedaŭrinde treege malrapide atingas nin precizaj sciigoj, kio malebligas redakti porgazetan informadon. Kiam fine alvenos detalaj raportoj per la organoj *Esperanto*, *Eventoj* kaj *Heroldo de Esperanto*, ni jam troviĝos ekster la feriperiodo kun novaj priokupoj ĉe la redakcioj, ol raportoj pri malfreŝaj novaĵoj.

Gazet-artikoloj

Pro ĉeso de nia abono ĉe Argus, ekde nun nur pere de via kunlaboro ni povas informi pri mencio de esperanto en gazetoj, ĉu pozitiva aŭ negativa. Tial ĉiu esperantisto nepre aktivu, tuj sendante al la CDELI-adreso se eble almenaŭ la paĝon de la gazeto, kie li trovis artikolon kun aludo pri esperanto. Samtempe li ne forgesu aldoni la nomon de la koncerna gazeto, la precizan aperdaton de la artikolo kaj ankaŭ la adreson de la redakcio.

Jen la kolektitaj artikoloj dum la pasintaj semajnoj:

Majo

La 17an: la organo *Il Cattino* en Lugano menciis esperanton en la

artikolo: "Informatica ed inglese nelle scuole?" Sendinto: Tazio Carlevaro.

Junio

La romanda revuo *L'Essor* No 4 publikigis sub la titolo "*Un instrument pour la paix*" priesperantan artikolon de Yvette Fink.

La gazeto *Alstadt Kurier* de Zürich en sia rubriko "*Ottilie Wildenau berichtet*": prezentis la poemaron *Tempo* de Stanislaw Skorupski. Sendinto S. Skorupski.

La 17an: en *Corriere del Ticino* en la rubriko *Chiasso* artikolo titolis "*Festate, esperanto dell'incontro globale*". Sendinto: T. Carlevaro.

18an: *Tages-Anzeiger*, rubriko *Kultur: "Himmlische Autoren"*. Artikolo de Benedikt Loderer pri la poemaro *Tempo* de S. Skorupski. Sendinto: S. Skorupski.

Julio

La 13an: la gazeto *Neue Luzerner Zeitung*, en sia rubriko *internet*, menciis esperanton inter la konsulteblaj lingvoj. Sendinto Bruno Graf.

Kiam artikolo negative raportas pri esperanto, tiam Claude Gacond tuj kontaktas reagantojn. Tiel okazis ekzemple kun artikolo de *Construire*, la romanda organo de Migros. Je la 14a de julio Marie-Claude Leburgue skribis en sia rubriko *Humeur humeur: "Je me*

souviens de la longue marche de l'espéranto en quête d'une langue universelle. Les espérantistes croyaient en ce nouveau message de Pentecôte... qui n'a pas pris."

Claude Gacond tuj dissendis fotokopie tiun artikolon al deko da personoj kaj je la 11a de aŭgusto Marie-Claude Leburgue en artikolo titolita "*Il est bien vivant!*" tiel parolis al siaj regulaj legantoj:

"Au mois de juillet, j'ai commis une erreur que je prie les espérantophones de me pardonner. Il l'ont fait d'ailleurs: leurs lettres fort charmantes en témoignent. J'ai parlé de l'espéranto au passé... alors qu'il est bien vivant et parlé quotidiennement. Depuis 1985, il ne s'est pas passé un seul jour sans que l'espéranto soit, quelque part dans le monde, la langue d'un congrès ou d'une rencontre internationale. Le très sérieux Pen-Club a admis, en 1993, une section d'écrivains espérantophones. Et sur le Net, l'espéranto se place en deuxième rang, juste après l'anglais. Nous devons ces précisions à plusieurs lecteurs de "Construire" (merci!) et notamment au linguiste Claude Piron (voir ci-dessus). Une fois de plus, je constate combien il est

agrèable d'apprendre... et de partager.

Sampaĝe super la rubriko de Marie-Claude Leburge, kun la titolo "*Et vive l'espéranto!*" aperis citaĵoj el la letero de Claude Piron.

Pluraj el la avertitaj samideanoj afable havigis al CDELI kopion de sia letero al Marie-Claude Leburge. Ĉiuj el ili kondutis tre ĝentile, kaj Lucienne Dovat eĉ sufiĉe sprite. Ni citu ŝin: "*Quand j'ai lu vos quelques lignes concernant la "disparition" de l'espéranto, c'était un peu comme si je lisais l'avis mortuaire d'un ami avec lequel j'étais en train de parler... C'était assez surprenant! Je n'ai pas pleuré mais souri...*

Madame, je pense que les espérantistes vous doivent un merci sincère, car vous leur donnez l'occasion d'informer (à nouveau!) les nombreux lecteurs de "Construire", que l'espéranto n'est pas mort et qu'il se porte mieux que jamais."

Kaj ŝi aldonis: "*Coïncidence amusante: La Présidente actuelle de L.E.S. (Laŭzana Esperanto-Societo) habite au No 21 du ch. du Coteau à Pully et que, sauf erreur, elle a l'honneur de résider en face de votre précédent domicile! Il s'agit de Jaqueline Vasserot. Dans l'annuaire télé-*

phonique, on peut aussi trouver son numéro de tél. et son adresse sous le mot "Espéranto" à Lausanne."

Ni iom longe raportis pri la pozitiva sekvo de niaj reagoj al la koncerna artikolo por malfermi rubrikon pri la artikoloj menci- antaj esperanton. Se vi malkovris aŭ malkovros aliajn artikolojn, bonvolu ilin tuj sendi al CDELI, kie ili konserviĝas kaj statistikiĝas kaj restas je la dispono de konsult- antoj. Kiel vi konstatis, okaze de bezono tuj organiziĝas reago.

Dieter Rooke atentigis Claude Gacond pri misinforma ŝerco aperinta je la 15a de julio en la gazeto *Blick*. El CDELI estis tuj informitaj pri la koncerna mal- afablaĵo nia prezidanto Bruno Graf kaj du aliaj alemanoj. Bruno Graf sendis al CDELI kopion de sia letero al la redakcio. Bedaŭr- inde neniu esperantisto sciigis al ni, ĉu citaĵo el tiu reago aperis en *Blick*. Ĉu leganto de tiu gazeto povus nin informi tiurilate?

Kiel vi konstatos per citaĵo, ankaŭ Bruno Graf reagis sprite:

"Einige unserer Mitglieder - und wohl auch Blick-Leser - fühlen sich durch den Comic-Strip von Jörg Müller und Peter Wyss betroffen, der witzelt: Esperanto sei eine Weltsprache, werde aber nirgends gesprochen. Ha, ha.

"Ja, das scheint so, wer die Fachwelt nicht kennt. Und über Minderheiten macht man sich gerne lustig.

"Pro memoria: Mehr Leute sprechen Esperanto als Rätomanisch, um einen Vergleich zu wagen. Aber sie leben nicht zusammen, sondern sind in vielen Ländern angesiedelt. Nächste Woche nehme ich am diesjährigen Esperanto-Weltkongress in Montpellier (Frankreich) teil, wo sich gegen 3000 Esperanto-Sprechende einfinden..."

Aŭgusto

8an: en *L'Impartial*, La Chaux-de-Fonds, rubriko *Brève* en la paĝo *La Chaux-de-Fonds* informis pri la forumo por la Esperanta Civito okazonta en CDELI la sekvajn tagojn.

La sama gazeto *L'Impartial* aperigis raporton pri tiu forumo la 15an de aŭgusto sub la titolo "*Le Grütli de la communauté espérantophone*".

20an: *L'Impartial*, La Chaux-de-Fonds kaj *L'Express*, Neuchâtel: per artikolo titolita: "*Suisse allemand: Un mini-guide pour s'y frotter*" prezentis lernolibron, kiun verkis Mireille Grosjean. Ŝi tiel respondis al la intervjuanto BRE koncerne sian plurlingvismon: "*Quand on me demande combien de langues je parle, je répons*

toujours quatre: français, espéranto, allemand et suisse allemand".

22an: Per la grava berna taggazeto *Der Bund* ni ricevas legindan informon: "Nobelpreis: ESPERANTO sda. Zum ersten Mal ist ein in Esperanto schreibender Schriftsteller für die Nobelpreis-Auswahl vorgeschlagen worden. Der 73jährige Bill Auld aus Schottland gelte als der grösste lebende Esperanto-Dichter, berichtete gestern die britische Tageszeitung "Times". Der frühere Luftwaffenpilot hat 52 Bücher, darunter zahlreiche Übersetzungen, veröffentlicht und wurde vom Autorenverband "Poets, Essayists und Novelists International" ins Gespräch gebracht." Sendinto: Bruno Graf.

En la rubriko *Echo* de la gazeto *Spuren* No 48 somero 1998 aperas tre taŭga respondo de Rolf Ernst en Zürich koncerne artikolon pri la ŝerclingvo *Europanto*. Tiu artikolo asertis, ke esperanto "*sei eine frühere universalsprache, die sich nie habe durchsetzen können*." Bedaŭrinde la koncernan artikolon CDELI ne ricevis. Kiu povus ĝin havigi?

Rolf Ernst ankaŭ havigis al ni artikolon, kies titolo estas: "*Java, das Computer-Esperanto*." Por ambaŭ sendoj okazintaj pere de

Bruno Graf, bedaŭrinde mankas konvena indiko pri la plena nomo de la gazeto kaj pri la redakci-loko. En CDELI estas preskaŭ ne-eble registri tiajn artikolojn sen konvenaj bibliografiaj sciigoj. Ni nepre petegas ĉiujn kunlabor-ontojn ĉiam havigi aldone al gazeteltranĉaĵo ties ekzaktan aper-daton, la kompletan gazet-nomon kaj la adreson de la redakcio.

Rememorigo kaj novaj sciigoj:

Esperable vi aliĝis al la
regiona semajnfino
kultura de SES
okazonta tre baldaŭ je la
12/13aj de septembro
en Cully (apud Lausanne)
Hôtel Major Davel

Programo

Grupo A kun François Randin:
Komencantoj.

Grupo B kun Mireille Grosjean
kaj Jean Thierry: Lingva kurso
por progresantoj.

Grupo C: kun Claude Gacond:
A! la malkovro de la
revuo *Literatura Mondo*.

Por la **distra vespero** estas
anoncita la nova filmo de François
Randin pri **aŭtomataj muzikiloj.**

Ĉiuj necesaj informoj kaj la aliĝ-ilo fotokopiebla aperis maje en *SES informas* 1998-3. Se vi atente tralegis tiun aliĝilon, vi eble rimarkis komikan eraron. Koncerne la vespermanĝon la unua plado ne estos franda salato kun **fulmita** salmaĵo, sed kun **fumita** salmaĵo.

Se vi perdis la aliĝilon, tamen ne hezitu aliĝi per telefono al Nicole Margot: ☎ (021) 653 14 67.

Ĝis baldaŭ en Cully!

Aliaj semajnfinoj

K.C.E.

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301
La Chaux-de-Fonds. ☎ kaj fakso: (032)
926 74 07.

Jen la temoj de la venontaj
monatfinoj:

Septembro 26/27ajn: **Eŭropa**
Unio kaj Svislando, prelegos d-
ro Giorgio Silfer, parlamenta
ataŝeo pri internaciaj rilatoj.

Oktobero 24/24ajn: **Kiel rilati al**
la gazetaro? prelegos d-ro Marco
Picasso, ĵurnalisto, fakulo pri
komunikado.

Novembro 28/29ajn: **KCE festos**
sian 30an datrevenon

Merkatika tago en Bern

21-an de novembro 1998

SES organizis antaŭ tri jaroj en Luzern seminarion gvidatan de Marco Picasso: "*Kiel informi pri Esperanto?*" Ni reprenas tiun fadenon por refreŝigi kaj profundigi tiun temon daŭre aktualan, ja aktualegan.

La labortitolo de la ĉi-aŭtuna seminario estas

"Proponi esperanton: kian, al kiuj, kiel?"

Ĉu la mondo bezonas esperanton? Pri tiu demando disputas kaj argumentas esperantistoj ekde la komenco de nia historio. Ĉu vere esperanto utilas por solvi la mondan lingvo-problemon? Kiuj estas la veraj valoroj de esperanto? Kiamaniere ni devas diskonigi ilin, tiel ke la homoj aŭskultu nin?

Dum la seminario ni provos analizi tiujn demandojn kaj ĉefe, kiamaniere apliki profesie la modernajn teknikojn pri komunikado. Ni ne povos "solvi" la problemon: sufiĉos alfronti ĝin serioze, ne blufe, nek pufe.

Preparado

Ni invitas la aliĝintojn antaŭstudi la temon laŭ peto de la kurs-

gvidonto. Ili solvas taskojn, kiuj preparas al la seminario. La unua tasko estas respondi al jenaj demandoj:

- Kio estas por vi esperanto? Bonvolu listigi la valorojn laŭ viaj spertoj.

- Kial junulo devus lerni esperanton?

- Kial triaĝulo devus lerni esperanton?

Sendu viajn opiniojn rekte al s-ro Marco Picasso, SES, CP 232, 6830 Chiasso 1. Laŭeble li komentos ilin antaŭ la seminario kaj invitos al plua tasko.

Kotizoj kaj aliĝoj

Por kovri la spezojn, ni fiksas jene la kotizojn.

- Membroj de JES/SES ĝis 29 jaroj: CHF 10.-

- Membroj de SES ekde 30 jaroj: CHF 20.-

- Nemembroj de JES/SES: CHF 30.-

Vi ĝiru la kotizon al Crédit suisse, Zürich, poŝtkonto 80-2372-3 favore al Svisa Esperanto-Societo, bankokonto 653677-40, kun indiko: **Merkatika Tago**.

Interesatoj aliĝu skribe aŭ telefone ĝis la fino de septembro ĉe Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen. ☎(031) 921 44 59.

Ni bezonas vian adreson, telefonnumeron, indikon pri membreco kaj ĉu vi partoprenis siatempe la seminarion de Luzern.

La aliĝintoj ricevos la detalan programon de la seminario en oktobro.

Ni esperas revidi la partoprenintojn de la seminario de Luzern cele al interŝanĝo de spertoj kaj bonvenigas novajn aktivulojn.

Bruno Graf kaj Marco Picasso

Ago-Tago 98

Enketado surstrata

La Ago-Tago estas instigo prezenti esperanton al la publiko, kiu ja miskonas nian lingvon. La laborgrupo pri varbado tial el-laboris koncepton. Ni invitas lokajn grupojn kaj membrojn partopreni en tiu kampanjo.

La Norvega Esperantista Ligo komisiis en 1995 firmaon enketadi, kiom da norvegoj scias pri esperanto. El tio rezultigis surprize, ke 59% de la norvegoj scias, ke ĝi estas lingvo, pli ol supozite. Sed frapis, ke la junularo scias plej malmulte pri esperanto.

La laborgrupo pri varbado opinias, ke niaj esperanto-grupoj kaj JES povus fari similan enketon lige kun la Ago-Tago 98 en oktobro, sen alstrebi profesian nivelon. Tia enketo estas loke farebla sen infrastrukturo. Bezonataj estas agemo kaj kuraĝo.

La laborgrupo preparis koncepton kaj demandaron. Ni planas enketi po 100 personojn en urbo: trione gejunulojn ĝis-30-jarajn, trione mezaĝulojn 30-60-jarajn, trione pliaĝulojn ekde 60 jaroj. La enketistoj pritaksu la eblan aĝon, sen rekte informiĝi pri ĝi. Eblas dungi studenton, ankaŭ neesperantiston, kaj bone enkonduki, eble akompani lin/ŝin.

Ni rekomendas, ke junul(in)o enketu gejunulojn. Ne enketu familioanojn aŭ konatojn, kiuj jam konas esperanton. Ankaŭ atentu, ke viroj kaj virinoj estu pli malpli samkvante enketitaj. Plej bone aktivu sur strato aŭ placo, kie politikaj grupoj ofte informas aŭ kolektas subskribojn. La grupoj fiksu mem la tagojn de enketado, kiu okazu en oktobro.

La demandaro similas al la norvega, sed estas pli simpla. Nur unu-du-tri demandoj. Ĉu vi scias, kio estas esperanto? Ĉu vi jesas esperanton? (nur al la personoj, kiuj scias). Ĉu vi deziras informojn pri esperanto? (nur al la personoj, kiuj jesas). Post la enketado ni analizos la rezultojn kaj la spertojn. Ili povos plibonigi nian kapablon informi kaj varbi.

Enketado estas informiĝo, ne varbado. Sekve la enketistoj informas nur tiom, kiom intereso deziras, ili akceptas kritikon kaj ili evitas disputon. Afabla kaj neŭtrala sinteno kreas favoran

situacion, ĉiu interveno finiĝu per danko.

La koncepto kaj la demandaro estas haveblaj ĉe la prezidanto: Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen. ☎ (031) 921 44 59.

Bruno Graf

C.D.E.L.I

Centro de Dokumentado kaj

Esploro pri la Lingvo Internacia.

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33,
2305 La Chaux-de-Fonds. ☎ 032 967
68 55. Fakso: 032 967 68 29.

En la somero 1981, aŭspiciita de CDELI, okazis ido-lingva seminario en La Chaux-de-Fonds, dum kiu la ido-poeto Andreas Juste prelegis pri la origino de ido kaj pri la kultura disvolviĝo de tiu planlingvo. Li tiam promesis verki eseon pri tiu temo kaj post 16 jaroj efektiviĝas lia promeso per unua eseo ege instruiga, kiun eldonis Tazio Carlevaro en 1998 sub la titolo *Idala Foliumo* en la kolekto Editerio Hans Dubois. En CDELI tiu 80-paĝa libreto estas konsultebla sub la signaturo Li TC 185

Aĉetemuloj interesataj pri planlingvistiko sin turnu rekte al D-ro Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona.

Estas konate, ke la friburga aristokrato Gonzague de Reynold

(1880-1970) sabotis la laboron de Ligo de Nacioj kaj favoris per ĉiuj siaj fortoj instaladon de kontraŭdemokrataj reĝimoj faŝismaj. Interalie li tre aktivis kontraŭ ĉiaj poresperantaj debatoj ĉe Ligo de Nacioj. Pli kaj pli CDELI posedas dokumentojn, kiuj reliefigas la fuŝlaboron de tiu dekstremega intelektulo kontraŭesperanta, kiu plenumis la rolon de persona konsilisto de Guisepe Motta, Jean-Marie Musy, Philipp Etter kaj Marcel Pilet-Golaz. La historiisto Aram Mattioli verkis tre gravan biografion pri tiu konsilisto, kies influo kondukis Svislandon al la nuna politika krizo. La eldonejo Orell Füssli en Zürich publikigis ĝin en 1994 sub la titolo *Zwischen Demokratie und totalitärer Diktatur: Gonzague de Reynold und die Tradition der autoritären Rechten in der Schweiz*.

Per la traduko de Dorothea Elbaz kaj Jean Steinauer ekzistas nun franca versio de tiu verko, kiun Editions Universitaires en Fribourg publikigis en 1997 sub la titolo *Gonzague de Reynold: Ideologue d'une Suisse autoritaire*. Tiu ĉi biografio estas nun konsultebla en CDELI sub la signaturo ESP 8711.

JES

Junularo Esperantista Svislanda
Marion Bélisle, Serre 28, 2300 La
Chaux-de-Fonds. belisle@span.ch.

Pasposta Servo jubileas

Pasporta servo de TEJO, la fama adreslisto por vojaĝemuloj, festos sian 25-jaran jubileon en 1999. Tiun jubileon TEJO ŝatus festi per rekorda eldono: la celo estas atingi la magian nombron de 1000 gastigantoj, kaj plifortigi la situacion en landoj kun malmultaj gastigantoj. Pro tio, se estos 1000 gastigantoj je la limdato, estos lotumitaj tri libroĉekoj de po NLG 100.- (enkasigeblaj ĉe la libro-servo de UEA) inter la gastigantoj de Pasporta Servo! Se vi iĝas nun gastiganto, vi povos gajni premion!

Jen la reguloj:

1) unu premion ni lotumos inter novaj gastigantoj en landoj, kiuj en la eldono 1998 havis tri gastigantojn aŭ malpli.

2) unu inter gastigantoj en la eldono 1998, kiuj varbis almenaŭ unu novan gastiganton.

3) unu inter ĉiuj gastigantoj de la eldono 1999!

Se vi varbas novajn gastigantojn, kaj ni atingos 1000 gastigantojn, vi mem lotumos en kategorio 2. La novaj gastigantoj menciui "varbita de" kaj sian nomon,

urbon kaj landon sur la aliĝilo. Ili mem lotumos en kategorio 3, eble eĉ en kategorio 1! Kompreneble vi povas ankaŭ varbi ekster via lando.

Aliĝiloj disponeblas ĉe Marion Bélisle, rue de la Serre 28, 2300 La Chaux-de-Fonds, belisle@span.ch.

Memorigo al la nunaj gastigantoj: vi nur aperos en la eldono 1999, se vi resendos la respondilon antaŭ la limdato: la 1-a de novembro!

Kore dankas kaj salutas Marion Bélisle.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj Svisa ILEI-Sekcio

Kunsido

Kunvokita de la prezidanto François Randin la ĉi-jara kunsido de la Svisa ILEI-Sekcio okazos en la hotelo **Le Major Davel** en Cully je la 10h00 sabate la 12an de septembro, do ĵus antaŭ la malfermo de la regiona semajnfino kultura de SES.

Esperanto-Kursoj

Sur la Interreto oni povas konsulti liston de ĉiuj esperanto-kursoj enlernejaj en la mondo. Tiu listo faciligas la rilatojn inter la kursanoj kaj la instruantoj. La responsulo de tiu listo estas

Maŭro La Torre, universitata profesoro en Roma, kaj la nova prezidanto de ILEI. Mireille Grosjean (poŝtfako 9, 2416 Les Brenets) estas en rilato kun li. Kaze ke iu esperanto-kurso komenciĝas aŭ finiĝas en Svislando, tiam bonvolu informi ŝin, kaj ŝi transdonos la sciigojn, por ke daŭre aperu aktualigitaj donitaĵoj pri Svislando. La adreso de la koncerna TTT-paĝo estas: www.uniroma3.it/lps/esp/eler/.

ISAE

Internacia Scienca Asocio Esperantlingva
Sekretario: Rudi Hauger, Ringstr. 13,
8172 Niederglatt.

Rudiger Hauger ne nur sekretarias, sed ankaŭ zorgas pri la redaktado de la organoj *Scienca Revuo* kaj *Nova Bulteno* de ISAE.

Neordinara okazaĵo en esperantujo: jam nun en la numero 1998-174 de *Scienca Revuo* oni povas legi la interesan prelegon, kiun Jacques Joguin prezentis ĉisomere en la 83a UK en Montpellier. Li analizis la kaŭzojn de "*La malapero de la dinosaŭroj*". Gratulon al la redaktoro Rudiger Hauger pro tiu akurateco neordinara en esperantujo.

Ni profitas la okazon por instigi la svisajn samideanojn, kiuj

interesiĝas pri scienco kaj pri la naturo, nepre aliĝi al ISAE.

En ŝtonminejo proksime de Solothurn malkovriĝis spuroj de dinosaŭroj. Kial ne prelegigi surloke Jacques Joguin pri la vivo kaj malapero de tiuj praaĵ bestegoj okaze de esperanto-renkontiĝo por sciencemuloj kaj naturamikoj esperantlingvaj?

Grupa vivo

Ni povas anonci kaj raporti nur laŭ sciigoj, kiujn ni ricevas. Dezirindus, ke el ĉiu loka societo post ĉiu esperanto-kunveno responsulo mallonge raportu al la redaktoro de *SES informas* pri la okazintaĵoj kaj samtempe anoncu al ni la datojn kaj programon de la venontaj aranĝoj.

Limdato

La limdato por la venonta *SES informas* 1998-5 novembro-decembro estas la 20a de oktobro.

Basel

Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214 57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim, Neubad.

Datoj de la venontaj kunvenoj: 24a de septembro renkontiĝo je la 20.00 en la restoracio "Weiherhof",

Neuweilerstr. 107, finhaltejo tramo 8. Kun Nicole Bérourd vizito al Karintio. La postaj kunven-datoj estas la 22a de oktobro kaj 26a de novembro.

La Chaux-de-Fonds

Esperanto-studo

En la salono de C.D.E.L.I, Biblioteko, pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55.

Post la somera paŭzo la studo de esperanto kun Claude Gacond en la CDELI-salono okazos tute regule je ĉiuj duaj kaj kvaraj merkredoj de la monato inter 19h45 kaj 21h45, krom dum la vesperoj kun koncerto de la "Société de Musique", tiam ĝi okazos je la ĵus antaŭa mardo. Ĉi-aŭtune la sekvaj datoj estos do la mardo 8a kaj mardo 22a de septembro, merkredoj 14a kaj 28a de oktobro, 11a kaj 25a de novembro kaj 9a de decembro. Ne forgesu ilin registri en vian kalendaron.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45.

Venontaj kunvenoj:

La Popola Universitato intencas starigi esperanto-kurson por komencantoj ekde oktobro 1998. Jara kosto de la kurso estos CHF

65.- por po unu horo semajne. Informu vian konataron pri tiu kurso? Enskriboj: Université Populaire de Genève, 23, rue du Vuache. ☎ 022 345 50 10.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02. **Kunvenoj:** 20.30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo.

Venontaj diskutrondoj en Hotelo Continental ekde la 18h00 ĝis la 20h00: 14an de septembro, 19an de oktobro kaj 16an de novembro.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. ☎ 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĉiun duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

Wil

Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎071 911 68 30. **Kunvenoj:** 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

Programo de la venontaj renkontiĝoj:

2an de septembro: 83-a UK en Montpellier (per lumbildoj) kun S. Pochanke.

7an de oktobro: Konversacio kaj legado de esperanto-gazetoj: *Literatura Foiro kaj Monato*.

4an de novembro: 50-a Kongreso de JFEF en Aalborg (Danlando) kun G. Eggenberger.

02an de decembro: Nikolaa Vespero.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 251 50 25

Kunvenoj: 19.15, Eisengasse 22, 8034 Zürich.

Esperanta familia rondo:

Kurveno ĉiumonate la unuan sabaton je la 14h30.

Esperanto-Intensivkurs für Anfänger jeden 2. Samstag von 12.15 - 14.00. Daten: 17.10.98, 31.10, 14.11, 18.11, 12.12, 9.1.99, 23.1, 6.2, 20.2, 6.3, 20.3, 10.4.

Venontaj kunvenoj:

Septembro 14an: Anita Alther per lumbildoj prezentos la duan parton de sia prelego pri Hindio.

Oktobro 12an: Pri Esperanto-Literturo kun Sonja Brun.

Varbcele petu disdoneblajn specimenojn de *SES informas*.

Libroj

Sub la titolo *1898-1998: Cent-jara asocia Esperanto-movado en Francio* la revuo *Franca Esperantisto* plene dediĉis tri el siaj kajeroj 1998aj al la historio de esperanto en Francio. Tiu enciklopedia verko 215-paĝa aperis el la revu-numeroj 498a, 499a kaj 500a de la nunjaraj monatoj junio, julio kaj aŭgusta.

En januaro 1898 Louis de Beaufront iniciatis la unuan numeron de *L'Espérantiste*, anoncanta la baldaŭan fondon de la organizaĵo *Société Pour la Propagation de l'Espéranto*. Pri la aktiveco mem de tiu propaganda societo kaj de la sekvaj organizaĵoj, kiuj ĝin anstataŭis, ĝis la nuna *Unuiĝo Franca por Esperanto*, detalege raportas Hervé Gonin, la redaktoro de *Franca Esperantisto*, kun la helpo de la historiisto Jean Amouroux.

Portretoj, ilustraĵoj kaj tabeloj agrabligas la legadon de ilia verko, kiun konkludas ege utila 20-paĝa indekso.

Por romanda sviso la trastudo de tiu historio de la franca esperanto-movado interese montras, kiom gravis la rilatoj, kiuj daŭre ekzistis inter la esperantistoj de Francio kaj de Svislando. Ekzemple la svisoj Jean Borel, Hector Hodler, Hans Jakob, Ernest Naville,

Edmond Privat, Claude Piron, René de Saussure kaj Henri Vatré estas menciataj en la indekso kiel signifaj roluloj ankaŭ rilate al la disvolviĝo de esperanto en Francio. Reciproke per lernolibroj, vortaroj kaj regulaj vizitoj ĉefe al Romandio, multaj francoj estos ankaŭ tutcerte menciataj en la indekso, kiu foje konkludos la historion de la svisa esperantomovado.

Ankaŭ en rilato kun Svislando menciindas alia verko. Temas pri la 487-paĝa *Festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal*, kiu aperis sub la titolo *Menade bal pŭki bal*, la devizo de Johann Martin Schleyer (1831-1912) signifanta en Volapük "*Al unu homaro unu lingvon*".

Pri Volapük en Svislando ĝuste tre interese raportas Andy Künzli en *Historia skizo* (paĝoj 411-420), kiu alportas tre gravajn sciigojn pri planlingva periodo ĝis nun malbone konata.

Alia artikolo verkita de Jean-Claude Caraco, esperanto-instruisto en la Universitato de Lyon, dediĉita al Auguste Kerckhoffs (1835-1903), la unua direktoro de la Volapüka Akademio (p. 391-404), rakontas la tragikan finon de tiu gravulo. La ĵurnalo *Oberländisches Volksblatt* je la 11a de aŭgusto 1903 raportas, kiel en la stacidomo Därlingen tiu

parizano ferianta en Oberlando estis akcidente surveturita de trajno, kie estis alvenantaj konatoj, kiujn li volis saluti.

La angla esperantisto Brian R. Bishop, ekde 1984 ĉifalo, tio estas glisha estro de la volapuka movado, raportas pri la vivo kaj aktiveco de siaj antaŭuloj. En tiu planlingve epokfara eseo pri la sinsekvaj estroj de la volapuka movado (p. 375-390) troviĝas kontribuo de Andy Künzli, alportanta tre precizajn sciigojn pri la sviso Jakob Sprenger (1872-1951), kiu ĵus antaŭ sia morto ludis la rolon de 4a ĉifalo en la jaroj 1948-1950). Ne multaj svisaj esperantistoj sciis, ke post la dua mondmilito la volapuka movado estis gvidata el Svislando.

Tiuj historiaj raportoj de Andy Künzli, ĉiam tre objektive dokumentitaj, estas antaŭsigno de lia aperonta *Enciklopedio de la svisaj planlingvaj movadoj*.

En la germanlingva kontribuo de Arthur Baur titolita *Die Geschichte der Esperantosen- dungen aus der Schweiz* (p. 45-50) bedaŭrinde ripetiĝas misinformo koncerne la komencon de mia redaktora funkcio ĉe Svisa Radio Internacia. Jam en *SES informas* 1997-4 p. 18a mi atentigis pri la koncerna malĝustajo.

(Fino sur la paĝo 16a)

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

Libroj (fino)

Ni ankoraŭ menciuj la kontribuojn de du ĝenevanoj. La denaska idistino Clara Kreis-Schneeberger interese priskribas la rolon de sia patro, kiu unue estis tre aktiva esperantisto, antaŭ ol viglegi en la ido-movado. Ŝia germanlingva artikolo estas titolita: *Friedrich Schneeberger (1875-1926): Seine Rolle in der Geschichte der Plansprachen* (p. 405-409).

Henri Vatré ne nur verkis la enkondukon (p. 5-6) al *Menade bal pŭki bal*, en alia teksto li analizas la tradukarton de sia amiko Reinhard Haupenthal (p. 341-345).

Claude Gacond

Mortoj

Mea culpa

Eraro miaflanka karakterizis la nekrologian artikolon pri Ardachès Stakian. Li ne estis honora membro de SES. Por estonte eviti falsan aserton, mi petis ia nunan liston de la honoraj membroj de SES al la kasisto

Barbara Pochanke. Tiuj ĉi estas Arthur Baur, Dante Bertolini, Werner Laederach, Fritz kaj Hanny Liechti.

Slava Pytloun

Ekde kvin jaroj Slava Pytloun gastadis en maljunula fleghejmo, kie li mortis la 22an de februaro 1998. Filo de esperantisto, li naskiĝis la 21an de novembro 1916 kaj aktivis en la esperantoklubo en Liberec (Ĉeĥoslovakio). Profesie en tiu lando li laboris ĉe la Ruĝa Kruco. En 1968 sekve al la rusa invado de Ĉeĥoslovakio li rifuĝis en Svislandon kun sia edzino kaj filo.

Antaŭ sia fuĝo li estis jam ekde multaj jaroj korespondamiko de s-ino Reutemann en St. Gallen. Tuj post sia instaliĝo en Winterthur li kontaktis la lokajn esperantistojn. Kaj li bone integriĝis en la svisa vivo pro sia perfekta kono de la germana lingvo. Li laboris ĉe zurika gazeteldonejo kiel korektisto. Dum kelkaj jaroj li plenumis la funkcion de kasisto de SES.

Claude Gacond

Aldonaĵo kunsendita (1):

Prangsschein / Recepte / Ricevuta

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862

CS ZUERICH-RIGIPLATZ

SVISA ESPERANTO-SOC.

2305 LA CHAUX-DE-FONDS

'AGADO 2003'

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Fr.

c.

Two empty rectangular boxes for currency and amount.

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Die Annahmestelle
L'office de dépôt
L'ufficio d'accettazione

Einzahlung Giro

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862

CS ZUERICH-RIGIPLATZ

SVISA ESPERANTO-SOC.

2305 LA CHAUX-DE-FONDS

'AGADO 2003'

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Fr.

c.

Two empty rectangular boxes for currency and amount.

Versement Virement

Mitteilungen / Communications / Comunicazioni

AGADO 2003

Giro aus Konto
Virement du compte
Girata dal conto

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Versamento Girata



P + A SA 10.97 90000000

PTT 442.03

000000000008620653677400015+ 070486279>

800023723>